

Ne estu koko, venu al KKPS!

Aĉetu tuj kalendaron kaj marku la lastan semajnfino de oktobro 2017 per dika markilo! Aŭ pli bone, rezervu la tutan monaton por antaŭpreparoj kaj frua alveno, ĉar vi nepre ne volos maltrafi tiun ĉi renkontiĝon. La sesa Klaĉ-Kunveno Post-Somera okazos de la 27-a ĝis la 29-a de oktobro 2017, en Lunteren, Nederlando.



Lunteren estas la urbo en Nederlando kun plej multaj kokoj. Krome ĝi havas grandan junulargastejon, kun luksaj kaj modaj amasloĝejoj. La loko estas kompreneble facile atingebla per publika transporto....


Mi komprenas, ke vi nun ĉiuj volas amase aliĝi, sed vi ankoraŭ bezonas paciencon. Por doni al

ĉiuj egalan ŝancon akiri lokon en la Klaĉ-Kunveno, la aliĝilo malfermiĝos je dimanĉo la 16-a de aprilo 2017 je 0:00 laŭ Lunteren-horo. Kotiztabelo kaj aldonaj informoj aperos ĝis



aprilo en

kkps.esperanto-jongeren.nl



Pos-Amiko

Vintro 2016, Numero 19

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Komitata listo
volas eksigi ĉiujn
TEJO-membrojn
1. Duolingo lanĉas
novan kurson
2. NEJ-estraro
kreskas senlime
2. Amasloĝi, la nova
modo
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj
4. EVENTOJ
KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno

@gmail.com

<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

Komitata listo proponas eksigi ĉiujn TEJO-membrojn

En la plej freŝa epizodo de la fama drama serio 'TEJO-komitato' okazis longa kverela diskuto, en kiu estis kreita nova rekordo pri kvantoj de akuzoj en minuto. La akuzoj flugis tiom fulme kaj vaste, ke ĉiu ajn unuopa TEJO-membro estis almenaŭ unufoje kulpigita pri perfido kaj korupto, kaj proponita por eksmembrigo.

Tio estus bona paŝo por la sendependiĝo de TEJO. Ĝi jam iĝis sendependa de UEA, sed ankoraŭ dependas de siaj membroj. Sen membroj kaj komitato la volontuloj kaj dungitoj de TEJO, kiuj jam preskaŭ estas pli multaj ol la komitato, povus multe pli efike agadi. Antaŭvidante tiun amaseksmembrigon TEJO jam dungis ses pliajn laborantojn kaj aĉetis aldonan domon en la centro de Roterdamo.

La fina rezulto povus esti, ke post la eksmembrigoj en TEJO kaj forpasoj en UEA, la plej granda Esperanto-asocio en Nederlando estos NEJ.

Duolingo lanĉas novan kurson


La furora sukceso de Duolingo kreis ondon da novaj Esperantistoj, kiuj nun inundas la junularajn kongresojn. Sed dum alveno al la novjaraj renkontiĝoj diversaj el tiuj novuloj spertis malfacilaĵojn komuniki kun tiuj, kiuj ankoraŭ ne lernis la facilan lingvon.

Pro tio Duolingo post du monatoj malfermos kurson en Esperanto pri la angla. Reprezentanto de Duolingo, C. Smith, klarigas: "Ni ne atendas superi la sukceson de Esperanto, sed Esperantistoj ofte scivolemas pri maloftaj lingvoj, do espereble estos iu publiko por lerni la anglan."

NEJ-estraro kreskas senlime

La Nederlanda Esperanto-Junularo, ĝis antaŭ mallonge nur konata pro la okazigo de la Klaĉ-Kunveno Post-Somera, spertis signifan kreskon en la pasintaj du jaroj. En 2014 ekzistis nur baza teamo por organizi la klaĉkunvenon, kaj nun en 2016 la NEJ-estraro kreskis de 5 al 8, kiel vi povas vidi en la apuda grafikaĵo:

Tiuj malgrandaj diferencoj kaŝas en si eksponentan kreskon, kiu post du jaroj jam povus konduki al kvardekkapa estraro, pli ol la nuna membraro de NEJ, 34 (malkiel TEJO, NEJ ne kaŝas siajn membrostadistikojn). La nova NEJ-estraro jam planas varbkampanjon por allogi la



baldaŭ eksigotajn TEJO-membrojn, sed eĉ tio verŝajne ne sufiĉos por 2019, kiam 63 estraranoj necesos.

Amasloĝi, la nova modo

Ekonomiaj analizistoj de la Pos-Amiko malkovris ŝokan evoluon per pristudi la kotiztabelojn de diversaj Esperanto-renkontiĝoj. La kotizoj por loĝado en amasloĝejo daŭre kreskadas, dum la kotizoj por loĝado en ĉambro restas samaj. Se tiu evoluo plu daŭros, post du jaroj amasloĝejoj estos pli kostaj ol ĉambroj! Merkata analizo montras, ke junuloj preferas la proksiman kundormadon, la aldonajn eblecojn por kusenbataloj, kaj ke oni ne bezonas (mal)elekti samĉambranojn. Jam unu internacia hotelfirmo planas oferti amasloĝejojn en ĉiuj siaj novkonstruitaj hoteloj.

Kantemuloj serĉataj!

Dum la internacia vespero de la Junulara E-Semajno okazos kiel tradicie prezento de la KKPS-kanto, tipa ekzemplo de koka kulturo. Ĉi-jare esceptokaze la ĥoro estos malferma por ĉiuj, kiuj volas partopreni. Se vi interesiĝas kunkanti, anoncu vin ĉe gvidanto S. Listo.

NEJ-Novaĵoj!

Kvina ludotago en Den Bosch

La kvina ludotago okazis sabaton la 12-an de novembro en Den Bosch ĉe ludoklubejo De Spellenfanaat. Ĝi komenciĝis je la 11-a matene. La unua ludo kiun ni ludis estis Sekreta Hitlero, kiu taŭgas por pli granda grupo kaj iom similas al la fama ludo Homlupoj. Ĉar oni malfacile trovas ludojn por pli ol dek ludantoj, ni disiĝis al pluraj grupetoj. Ni provis multajn ludojn, kelkajn pli seriozajn, aliajn pli amuzajn. Posttagmeze la volontuloj de TEJO lasis la ludoĉambron kaj daŭrigis la tagon pli serioze. En la najbara ĉambro ili havis estrarkunsidon.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Vi kredos vian horoskopon.

Taŭro: Vi malkovros, ke pli bonas vekado ol vekado.

Ĝemeloj: Via patrino pli bone bambumos ol vi.

Kankro: Vi decidus ŝanĝi zodiakan signon.

Leono: Via plej ŝatata frukto fakte estas legomo.

Virgulino: Post malvarma nokto vi ne plu estos.

Pesilo: Mankas lumo en la amasloĝejo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Okaze de dubo, ridetu.

Kévin M.: Preparu vivresumon por la NEJ-estramo.

Sagitario: Turniĝu dekstren.

Kaprikorno: Ne faru novjaran plonĝon sen varma ĉapo.

Akvisto: Parku vian trajnon ekster la kongresejo.

Fiŝoj: Vi akcidente legos la statuton de UEA.

Mojosa ejo kun bunta oferto de tabloludoj, multaj manĝaĵetoj, kiujn prizorgis ege gastige-ma posedanto de la ejo, kiu mem estas bona ekzemplo de pasiva lernado de Esperanto. La ludemo de ludintoj kaj ĝenerale bona etoso do estas recepto por sukcesa NEJ-tago.

Nova estraro de NEJ

Ekde la 29-a de novembro la Nederlanda Esperanto-Junularo havas novan estraron:

Rogier Hurman – prezidanto

Nika Siebenreich – sekretario

Nico Hurman – kasisto

Joop Kiefte – informado

Agata Cichocka – planado

Robin van der Vliet – kontakto kun TEJO

Spencer van der Meulen – kontakto kun EN

Frank van Hertrooij – kontakto kun VS